# Bona Espero

**Cirkulero 56**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.**

prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, Tel.: 02902-57460
retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 2001-04-04

Karaj geamikoj kaj subtenantoj,

hodiaŭ vi ricevos – tute speciale – vian informbultenon rekte el la paradiza loko Bona Espero en Brazilo, kie ĉio okazas, kion vi tiel bonkore subtenas per via solidara helpo! Ĉu ĉiuj de vi efektive jam konsciiĝas pri la fakto, ke nia subtena organizo ĵus je la 24a de marto oficiale atingis la fieran aĝon de 20 jaroj?! Ankaŭ pro tio ni rigardas kiel bonŝancan cirkonstancon ke unuafoje Ursula Grattapaglia kaj mi verkis kune ĉi-tiun rondleteron, certe la pli ampleksa parto de Ursula.

Nia duona estraro (t.e. mia edzino Uschi kaj mi ) havis la unikan okazon partopreni la jaran ĝeneralan asembleon de Bona Espero kun la ĉeesto de la kompleta estraro, dum kiu oni priparolis la realigojn de la pasinta jaro, la buĝeton kaj la perspektivojn por la estonteco.




En brila suna tago de brazila aŭtuno, kun la bruo de la multaj infanoj, ni sentis la unikan etoson de tiu paradiza loko, kie senhejmaj infanoj ricevas ĉion kion ili bezonas por povi kreski sanaj, sekuraj kaj feliĉaj.
Jam dum multaj jaroj nia asocio subtenas la laboron de Bona Espero, kaj ni povas konstati, ke fakte ni ne investis vane.

**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**
La adreso de la kasistino: Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, ☎ +49-(0)2904-6417

Novaj infanoj povis esti akceptataj, ĉar multaj grandaj jam flugas per propraj flugiloj; ni nur menciu Adão, Renato, Alexandro, Odiane, Odineide, Maria, Iraci, Grasiele – ili feliĉe ĉiuj daŭrigas siajn studojn kaj tamen laboras dum duona tago por subteni siajn patrinojn, (ĉar ĝenerale patroj ne estas eĉ konataj). Cetere Amanda nun vendas siajn artajn manlaboraĵojn en Alto Paríso, dum ŝia edzo gvidas hotelon kiel direktoro.

Pri la granda fajro de aŭgusto:
la loĝata areo, t.e. la domoj, la legomejoj kaj frukto-arbaroj estas denove komplete ĉirkaŭbarita, tamen por definitive protekti la bienon de la fajro oni estas farantaj vivan, verdan barilon de fortaj agavoj, kiujn la fajro tute ne povas trapasi, ĉar ili verdas eĉ en la plej seka sezono! La 7km longan barilon por la bovinoj oni ne povis repari, ĉar la kostoj tute ne valoras la investon de tia granda sumo de mono; la estraro decidis transdoni la bovinaron al la najbaro (cetere germandevena familio kaj tre laborema), kiu sendas, per la lerneja transportbuso, la ĉiutagan lakton kaj fromaĝon por la infanoj.


La klopodoj eviti la tiel nomatan "fuĝon de la kamparanoj" direkte al la grandaj urbaj faveloj, estis ek de ĉiam parto de la politiko de Bona Espero; en tiu kunteksto ni povas informi vin, ke tri el la eksaj lernantoj laboras nun aktive en la institucio: avantaĝo por Bona Espero kaj por ili! Orlando, kompetente kunlaboras en la agrikulturo kaj dommastrumado, dum Adarci kaj Ursula instruas en la lernejo.



Jes, ja bonaj novaĵoj: la lernejo denove funkcias!
Kaj funkcias kun la klasoj 1 ĝis 4 por la multaj novaj etuloj, el kiuj 27 loĝas en Bona Espero kaj aliaj 8 venas dumtage per la buso de la registraro, kiu forportas al la urbo 6 el la granduloj, kiuj kursas en pli altaj klasoj.

Entute estas kun ni ĉiutage 20 knabinoj kaj 15 knaboj inter 5 kaj 15 jaroj. Bedaŭrinde inter la "novaj" estas denove unu handikapulo: Carlos, 8jara, mense postrestinta, havas unu blindan okulon. Li venis kun siaj du gefratoj Tamara, 10jara, kaj Paŭlo Sergio, 11jara, ĉar ilia patrino ne povis zorgi por ĉiuj de siaj multaj infanoj, ĉiu de alia patro.

La infanoj dormas en tri domoj, sed kune tag- kaj vespermanĝas, rotacie en la diversaj loĝdomoj, kies nomoj estas romantike dirita Lar Solar (sunhejmo), Lar das flores (florhejmo) kaj Lar dos livros (librohejmo). En la antaŭa lerneja domo (sunhejmo) nun loĝas Ursula kaj Giuseppe kun 16 infanoj, dum la malnova konstruaĵo (librohejmo) nun utilas kiel nova lernejo kun 2 klasĉambroj kaj loĝejo por Adarci kaj Igor kun 2 knaboj.



La edukaj instancoj de Alto Paraíso pagas la salajron de unu instruistino, Adarci, kaj la alian, Ursula Pereira dos Santos, 20jara, kiu diplomiĝis en decembro kiel elementa instruistino, estas pagata de nia subtena asocio. Cetere same kiel Orlando.
Interese estas, ke antaŭ la instruistinoj sidas infanetoj sur la samaj seĝoj, ĉe la samaj tabloj kiel Adarci antaŭ dudek jaroj, kiel Ursula Pereira antaŭ 15 jaroj. Estas vere tempo por aĉeti novajn tablojn kaj seĝojn!

Kaj niaj planoj tion permesas: La laboro de Bona Espero intertempe tiel larĝe disvastiĝis, ke eĉ la loka Rotaria Klubo sendas de tempo al tempo siajn volontulojn por sporada kunlaboro. Dum la jaroj, tio rezultigis nun novan partnerecon. Inter alie aldona unufoja (bedaŭrinde laŭ ĝia statuto) subteno per la Internacia Rotaria Fondaĵo finance ebligis la transformadon de la sunhejmo.
Tiu ankaŭ estas por ni bela okazo kunlabori aktive en la renovigo de la lerneja strukturo, kiu fakte bezonas urĝan reformon.

Ni "kunportis" el Germanio la volontulinon Gaby, kiu pretas kunlabori dum 6 monatoj en Bona Espero, kaj feliĉe ni povis konstati ŝian rapidan kaj harmonian adaptiĝon, certe ankaŭ kaŭze de ŝia diligenta, sukcesa studado kaj de la esperanta kaj de la portugala lingvoj!

Bonegaj kunlaborantoj ekde decembro estas ankaŭ Gloria kaj Moacyr, esperantista geedza paro el Recife, la devenurbo de la fondintoj de Bona Espero. Ili loĝas en la "florhejmo" kun ni, Gaby kaj 8 knabinoj, li kompetente pri la agrikulturo, ŝi pri la kuirejo.

Kvankam Adarci devas zorgi por sia filo Igor, instruas ĉiutage en du lernejoj (BE kaj en Alto Paraíso) kaj studas dufoje monate je la semajnfino en la universitato de Formosa, apude ŝi ankaŭ ĉiam estas granda helpo por Ursula, fakte ŝi konas ja ĉion ekde 23 jaroj! Ursula kaj Giuseppe ni nur ĉiam povis admiri pro ilia nelacigebla, prefere pli malfaciliĝanta laboro, kaj ĉio dum emeriteca aĝo. Finfine ili konstruis la nunan Bona Espero preskaŭ el ruinaĵo: unika kaj nekomparebla sukceso!

Dum nia trisemajna restado en Bona Espero mia edzino kaj mi klopodis subteni la ĉiutagan, ofte streĉan, sed tre valorindan laboron kun la infanoj kaj instruis al ili Esperanton. Gaja infana ridado, dankemaj rigardoj, ridantaj aŭ same kelkfoje tristaj infanaj vizaĝoj restas en nia memoro kaj ĉiam akompanos niajn aktivecojn por Bona Espero.
Multaj karaj amikoj denove kontribuis, ke ni ankaŭ rilate al la aldonaj fairaj domaĝoj povas helpi same kiel ĉe la nunaj necesaj restrukturadaj laboroj. Ĉiufoje imponan monosumon ni ricevis lasttempe per tio, ke amikoj ĉe "rondaj" naskiĝtagoj rezignis donacojn favore al la infanvilaĝo, sammaniere kiel geedza paro ĉe siaj tradiciaj Esperanto-renkontoj.
Ankaŭ ĉiumanieraj jubileoj, laboreja, lerneja, kirka aŭ najbara festoj k.s. eblas ja laŭ mi kiel helpagado por niaj infanoj.

Karaj geamikoj kaj subtenantoj, ĉifoje ni ŝatas esprimi – pro konvena okazo – tute specialan dankon al la fondaj membrinoj de la subtena organizo Margret Brandenburg, Ursula Schrapp, Henriette Otto kaj Adelheid Holtmann same kiel al la antaŭaj prezidantinoj Margret Brandenburg kaj Heti Fischer anstataŭe por la respektivaj estraroj! Ilia altruista, laborplena kaj sukcesa agado ĉefe ebligis la konstruon de la infanvilaĝo en ĝia nuna formo sammaniere kiel ĉi-tiun jubileon.

Kompreneble atingeblis ĉi-tiu fiera, sukcesa bilanco per tio, ke vi – multaj el vi de komence – konservis la fidelecon al Bona Espero ĝis hodiaŭ, kaj pro tio ni dankas vin plenkore. Vin kaj ĉiujn novajn donacintojn, kiujn ni kun tio kore salutas, ni petas daŭrigi vian helpon por nia komuna celo: la subteno de la sammaniere bezonantaj helpon kiel amindaj infanoj de Bona Espero!

**Nome de la tuta estraro al ĉiuj de vi belan Paskon!**

Otto Vollen

**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**
La adreso de la kasistino: Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, ☎ +49-(0)2904-6417